

N. N. 32,

En rose så jeg
skyde

*tradukita de Thomas
Laub*

En rose så jeg skyde
op af den frosne jord,
alt som os fordum spåde
profetens trøsteord.
Den rose spired frem
midt i den kolde vinter
om nat ved Bethlehem.

For rosen nu jeg kvæder
omkap med Himlens
hær:
en jomfru var hans mo-
der,
Maria ren og skær.
I ham brød lyset frem
midt i den mørke vinter
om nat ved Bethlehem.

Den rose fin og lille
har dejlig duft og skær,
den lyse for os ville
og sprede mørket her.
I sandhed mand og
Gud,
af syndens nød og pine
han nådig hjalp os ud.

...

N. N. 32,

Elkreskis roz-
branĉeto

*tradukita de Joachim
Gießner*

1. Elkreskis roz-
branĉeto
el rozarbust' de Di'.
Aŭguro de profeto
rakontis jam pri ĝi.
Naskiĝis rozfloreto
meze en vintra nokto
laŭ diro de profeto'.

2. Ja naskis tiu rozo -
Jesaj' prognosis ĝin -
el sia korpo sproson
Mari' la virgulin'.
Laŭ dipotenca vol'
ŝi naskis Di-infanon
por tuta mond' kon-
sol'.

3. Kaj tiu belfloreto
tre hele lumas ĝi.
Obskuron la brileto
forprenas nun de ni.
Vi hom' kaj vera Di'
el pekoj kaj suferoj
estas savant' por ni.

...

N. N. 32,

Jen ĉiamviva
Rozo

*tradukita de Leland
Bryant Ross*

Jen ĉiamviva Rozo
laŭ vorto de profeto'
El la Jiŝaja ŝoso
ekkreskis kun im-
peto'.
Ĝi venis, hela Flor',
en frida tempo vin-
tra
Je noktomeza horo'.

Jesaja ĝin anoncis,
la menciita Flor';
Maria ĝin responsis
el patrin-ama kor'.
Ŝi naskis Rozon por
klarigi Dian amon
Je noktomeza horo'.

Ĉi tiu milda Floro
per sia dolĉ-aromo'
Heligas per Digloro
la vojono de la homo'.
Ja homo, tamen
Di',
ĝi ŝarĝojn malpezi-
gas
Kaj homojn savas
ĝi.

...

N. N. 32,

Rozbranĉo
forĝermadis

tradukita de Felix Ney

Rozbranĉo forĝermadis
el trunko de nobelec'.
Prauloj jam kantadis:
de Jiŝaj ĝia spec'.
Floreton portis ĝi,
en akra vintro estis,
Je horo de noktomezo'.

La branĉo anoncita
Jesaja de profeto':
Maria netuŝita,
de kiu la floreto'.
Eterne volis Di':
naskinta infaneton
Plej pura restis ŝi.

De tiu eta floro
alvenas bonodoro'
Ĝi brilas en la koro,
mallumon pelas for.
Homido, Dia Vorto',
nin el sufero helpas,
De pek' Savanto' kaj
morto'.

...

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en la Danan de Thomas Laub.

Arg-618-1249 (2012-10-19 19:29:42)

Tiu ĉi danigo de la kanto troviĝas en <http://ingeb.org/spiritua/esistein.html>. Vi-
du ankaŭ: http://da.wikisource.org/wiki/En_rose_s%C3%A5_jeg_skydekaj http://www.ugle.dk/en_rose_saa_jeg_skyde.html.
Pri Thomas Laub vi-
du la retejn http://de.wikipedia.org/wiki/Thomas_Laub.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).

Arg-618-1244 (2012-10-18 21:24:22)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html>. sub <http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de LELAND BRYANT ROSS (Ros’ Haruo).

Arg-618-1247 (2014-09-08 13:06:28)

Tiu ĉi traduko troviĝas en <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/j/jencxiamu1.html>.
Pluaj tradukoj de la sama aŭtoro troviĝas sub http://www.reocities.com/cigneto/thcbio/r/ros_h.html.
Pri la tradukinto vidu la facebook-paĝon <https://www.facebook.com/leland.ross/photos>.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de Felix Ney.

Arg-618-1246 (2012-10-18 22:27:59)

Tiu ĉi Esperantigo troviĝas en la retejo <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/r/rozbranca1.html>.